

Pri la ibeksoj
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 525, 1981.10.22 & 24

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

En kelkaj privilegiitaj regionoj de la montaroj Alpoj kaj Ĵuraso oni povas observi ibeksojn, tiujn imponajn sovaĝajn kaprojn, kies kornoj formas grandegan duoncirkulon. Ne tre moviĝemaj, ili ŝatas kiel loĝ-lokon la rok-krutaĵojn horizontale interrompitaj de mallarĝaj balkonoj aŭ de deklivegaj herbejoj kaj vertikale distranĉitaj de fendoj, ŝtonaroj aŭ lavangejoj. Ili tie vivas la tutan sezonon, kontraŭe al la ĉamoj, kiuj forlasas tiujn malmildajn montflankojn, kiam alvenas la neĝsezono.

A.- Tiuj grandaj alpaj kaproj, kiuj longas unu metron kaj duono, altas ĉe la postkolo preskaŭ unu metron kaj pezas ofte pli ol cent kilogramojn, malrapide fuĝas, kiam alvenas homoj, iliaj nuraj malamiko. Kiam la vento anoncas al ilia sufiĉe bona flarsento la alvenon de homo, ili jam reagis je distanco de centoj da metroj, sed kiam la vento estas favora al ilia observanto, ili lasas lin alproksimiĝi ĝis proksimume kvardek metroj, antaŭ ol ekmoviĝi. Kaj ilia foriro estas tre digna, malrapida kaj ofte interrompita de haltoj.

C1.- Tial ili fariĝis tre facile viktimoj de la ĉasistoj, kontraŭe al la ĉamoj, kiuj estas rapidaj en sia fuĝo. Ekde la deksepa jarcento ili pro tio komplete malaperis. Eĉ en Alta Engadino, en la Grizona lando, kie ilia ĉasado estis malpermesita, ili preskaŭ komplete malaperis. Nur sur la flago de tiu ĉi kantono ili estis facile observeblaj.

A.- Ili tamen ne komplete malaperis. Tion ĉi atestis de tempo al tempo unu el iliaj kadavroj en lavanga defalaĵo. Ili vivis en grupetoj multe pli alte ol la tiamaj ŝtelĉasistoj kapablis grimpi. Pro tio, kiam ilia protektado fariĝis pli efika ĉirkaŭ la jaroj 1920, dank' al strikte observitaj leĝoj, ili komencis iom post iom remultiĝi en sesoj da naturprotektejoj. Oni kaptis individuojn por ilin meti en aliajn konvenajn lokojn, kiel ekzemple en la ĵurasan rokcirkon Le Creux-du-Van.

C1.- Tien inter 1965 kaj 1970 estis alportitaj 13 individuoj, kiuj tuj ekŝatis sian novan loĝlokon, kontraŭe al tio, kio okazis en aliaj regionoj. Estas fakto, ke la monto Le Creux-du-Van kun sia rokkrutaĵo tricentmetrojn alta kaj plurkilometrojn longa, estis ideala ibeksejo.

A.- En tiu naturprotektejo de la montcirklo Le Creux-du-Van, kiun vizitadas multaj turistoj dum la tuta jaro, la ibeksoj pli kaj pli kutimiĝis je la renkontiĝo kun homoj, kaj nur kiam la promenantoj tro bruas, estas akompanataj de hundoj aŭ alproksimiĝas je malpli ol dek metroj, ili komencas foriri. Tial oni povas ilin observadi dum la tuta jaro. Tamen ilia vivo restas tre sekreta, ĉar ĉefe nokte ili moviĝas.

Cl.- Oni povis konstati, ke ili tre malrapide multiĝas, kontraŭe al la ĉamoj, kio ankaŭ klarigas, kial ili preskaŭ malaperis, kiam ilia protektado ne estis sufiĉe efika. En protektejo ilia nombro duobliĝas dum periodo de proksimume sep aŭ dek jaroj. Kaj nur kiam ili komencas formi tribon de pli ol tridek individuoj, ili tendencas forpeli la gejunulojn, por ke ili iru al la malkovro de aliaj loĝlokoj. En la regiono, pri kiu ni parolas, ekzistas ŝajne nuntempe tri tiaj triboj, kiuj restadas en bone difinitaj teritorioj.

A.- Dum la plimulto de la jaro la inoj kaj iliaj idoj vivas apartigitaj de la viroj. Ĉiu sekso havas sian restadejon. Kaj ŝajnas, ke inter la viroj kreiĝas tuta hierarkio. Povas esti, ke nur la

plej fortikaj viroj rajtas viziti la inojn dum la seksarda sezono, kiu koincidas kun la fino de nia monato novembro kaj la komenco de la monato decembro. En tiu ekvintra periodo, dum kiu la tagoj estas mallongaj, la observado de la ibeksaj moroj estas malfacila, des pli ke la interseksaj renkontiĝoj okazas en tre krutaj deklivoj.

C1.- La inoj naskas nur unu idon komence de la maja monato, kaj tiuj bestetoj estas farte tre delikataj. Ili ofte mortas pro intestaj malsanoj, kio klarigas la malrapidan kreskon de la individuaro.

A.- Estas. impresige observi, kiel tiuj idoj sekvas sian patrinon sur la mallarĝaj rokbalkonoj, super krutajo teruriga kaj kiel ili lernas salti supren de ŝtono al ŝtono en la rokfendoj. Sed tiuj ĉi promenadoj en la rokaro estas tre malrapidaj kaj mallongaj. Sur fakte sufiĉe malvasta areo paŝtas tiuj sovaĝaj kaproj. Kaj tute simile al la domkaproj ili elektas sian nutraĵon, plukante tie kaj tie-ĉi la ŝatatajn plantojn, Ili ĉefe paŝtas fru.matene antaŭ la sunleviĝo kaj vespere je la sunsubiro. Dum la plej granda parto de la tago ili ripozas sur iom kaŝita rokbalkono remaĉante kaj eble admirante la vastan panoramon, kiu malfermiĝas antaŭ iliaj okuloj.

Cl.- E1 sia observejo ili ne emas foriri, ĉar tre verŝajne ili sentas sin en plena sekureco, eĉ se promenantaj turistoj instaligiĝas sur vidalvidaj terasoj je kelkaj metroj, kiel tio kelkfoje eblas. Ili lasas sin foti, kaj plej ofte estas la homo, kiu plej rapide formigras.

A.- Ni konkludu nian rakonton pri la ibeksoj aŭ sovaĝaj kaproj per persona observado

C1.- Okaze de ekskurso kun gelernantoj dekdujaraj, komence de la monato oktobro, tre frue matene, antaŭ la sunleviĝo, ni iris observi la ibeksojn. Kaj ni havis eksterordinaran spektaklon. Borde de la rokkrutaĵo ni rimarkis du viribeksojn. Mi signis al la tuta klaso sidiĝi. La sovaĝaj kaproj sin alfrontis kvazaŭ malamikoj, kornoj kontraŭ kornoj. Ni aŭdis ilin spiregi. Subite ambaŭ virkaproj malantaŭeniris, kaj tuj poste ili kuregis unu kontraŭ la alian, kaj ni povis aŭdi la frapon de iliaj fruntoj. Kaj denove iliaj kornoj kunplektiĝis, ĉiu provante senmovigi la kontraŭulon. Dum ili tiel batalis, ni iom post iom alproksimiĝis, ĝis kiam la geknaboj formis vicon da spektantoj je apenaŭ kvin metroj de la luktantoj. Fine, post preskaŭ duonhoro, ni konstatis, ke unu el la ibeksoj eklaciĝis. Kiam ĝia kontraŭulo kuris al ĝi, ĝi emis retiriĝi, kaj verŝajne eviti la ŝokon de ĝiaj kornoj. La venkito iom post iom retiriĝis ĝis la bordo de la krutaĵo, kien la venkanto provis ĝin puŝi. Sed ĉio finiĝis en paco. La venkito malaperis en rokfondon kaj la venkanto revenis al ni, kvazaŭ por fiere admirigi sin. Sed ho ve por ĝi. Tiam aperis, alvenante el alia rokfendo, pli impona virkapro. Tiu ĉi malrapide alproksimiĝis, kaj je nia miro ni konstatis, ke la ĵusa venkinto samrapide retiriĝis el la batalkampo, ĝis kiam restis nur la novalveninto, verŝajne la virĉefo. Kaj tuj tiu impona bestego komencis tute kviete paŝti antaŭ la observantoj. Jen okazaĵo, kiun tiuj gelernantoj neniam forgesos, kaj kiu ilustras la luktojn, kiuj anoncas la seksardan tempon.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gresinjoroj Claude kaj Andrée Gacond rakontis pri la ibeksoj, tiuj sovaĝaj kaproj vivantaj sur la montoj. Ĝis reaŭdo!